

Instru-cirkulero dec. 2005  
Informilo por E-instruantoj, instruistoj, interesitoj pri E-instruado

Saluton! Jen kelkaj fresxaj informoj pri E-instruado:

1. Oficiala instruado de E-o en universitatoj kaj superaj lernejoj

Germain Pirlot <gepir@hotmail.com> intencas, gxis la fino de la jaro, gxisdatigi sian kompiladon pri E-kursoj \_"oficiale"\_ organizataj en universitatoj kaj samnivelaj altlernejoj.

Bv. helpi tiun gravan laboron kaj sendi la deziratajn informojn!

Gekolegoj en Bamberg, Berlin, Emden, Leipzig, Münster ????? aux/kaj kie ancorau????

Bv. informi ankaux min: [zsofia.korody@esperanto.de](mailto:zsofia.korody@esperanto.de) Dankon.

-----  
Jen la informoj, kiujn li bezonas laux jena modelo :

- a) universitato aux supera instituto + adreso, nacilingve laux latina alfabeto
- b) kursgvidanto + privata adreso, posxta kaj reta - /P/ la kursgvid. estas pagata
- c) mallonga priskribo - horoj/semajne ; sume. kun ekzameno, studunuoj, atestilo.

Bonvolu lauxeble diskonigi, por ke la kompilajxo estu kiel eble plej kompleta kaj fidinda.

Jen denove la adreso: Germain Pirlot [gepir@hotmail.com](mailto:gepir@hotmail.com)

2. Por universitataj gestudentoj venis oferto el Cxehxio por dusemajna somera kurso en lingvotendaro. La duono de la kostoj estos repagebla per subvencio de cxehxa-germana fonduso. Se vi interesigxas, bv. tuj informi min!

3. En Germanio ne estas universitata klerigado de E-instruistoj, ne eblas akiri diplomon tie, sed la Germana Esperanto-Centro en Herzberg ofertas alternativan solvon: per telestudado kaj la semajnfinaj studsesioj eblas preparigxi: lerni pri E-gramatiko, lingvistiko, interlingvistiko, E-literaturo, historio, movado, E-kulturo, metodologio. Post la plenumo de postuloj la regulaj partoprenintoj ricevas atestilon, farigxas kursestroj aux instruantoj. Tiuj studsemajnfinoj ankaux servas la pluklerigadon de E-instruantoj. Bonvenon!

La sekva studsesio okazos inter 9-11 decembro, 2005. Gastprelegonto: d-ro R. Fischer.

4. Inter la postuloj por akiri E-instruantan atestilon enestas nacia kaj internacia ekzameno. Pro tio Germana E-Centro kunlaboras kun Germana Esperanto-Instituto (GEI) kaj UEA/ILEI. En aprilo 2006 ni intencas organizi ILEI ekzamenojn laux favoraj kondicxoj, (tauxga ankaux por la monujo de gejunuloj). Detalojn, alvokon ni sendos baldaux.

5. La 28an de novembro reprezentantoj de Germana Esperanto-Centro en Herzberg laux invito de la direktoro de la subdistrikta gimnazio informis cxiujn geinstruistojn, cxeestantajn gepatrojn, gelernantojn pri Esperanto, gxia internacia uzebleco, la gxemelurba projekto kaj la servoj de Interkultura Centro Herzberg. Lauxplane E-instruado komencigxos en la gimnazio en februaro 2006.

6. Ni dauxrigas la ellaboron de la datumbazo por E-instruantoj, instruistoj, ktp. Pretigxis programo por rapida kaj facila dissendado de cirkuleroj. Ni atendas por dissendo ankaux viajn informojn, ideojn, konsilojn, ktp. rilate al E-instruado en Germanio, k.a.

Se vi ankoraux ne faris, bv. plenigi kaj sendi la enketilon-registrilon troveblan cxe:

<http://instrureg.laarts.info> ! (Al tiuj, kiuj ne havas ret-aliron, mi volonte sendos gxin posxte.)

Kun multaj salutoj:

Zsofia Korody

GEA-komisiitino por instruado